

Jan Blahoslav

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 11-an de decembro 2013

Enkonduko

Jan Blahoslav (1523 - 1571), episkopo de Moravia Kunfrataro (alie Unuiĝo de Fratoj), estis renesanca homo kaj humanisto.

Kio estas humanismo?

Bohemia verkisto Adolf Hoffmeister (1903 - 1973), kiu dum la dua mondmilito estis en usona ekzilo, rakontis historieton pri iu bohemia komercisto, kiu alvenis en la usona ŝtato Teksaso. Li troviĝis en rando de dezerto. Varmega vetero estis. La komercisto neniu rigardis tie, sed ekaŭskultis iun ĉeĥan paroladon. Li pli bone rigardis, sed ekrigardis nur du nigrulajn knabojn, kiuj sidis en ombro kaj babilis. Ĉu nigruloj en Teksaso parolas ĉeĥan? Ne, tio ne estas ebla. Li denove ekaŭskultis ĉeĥajn vortojn, eĉ en hanaka dialekto, kiujn oni uzadas en Moravio proksime de la urbo Kojetín. La komercisto pensis, ke li jam halucinigas de varmego. Post kelkaj minutoj li aŭdacis demandi unu nigrulon: „Perdonu, sinjoro, ĉu vi estas ĉeĥo?“ kaj pripensis: „Mi verŝajne jam tute frenezuliĝis, ĉar mi demandas nigrulon en teksasa dezerto, ĉu li estas ĉeĥo?“ Sed la nigrulo bele ekridetis kaj respondis: „Ne, ja su Moravec.“ („Ne, mi estas moraviano.“ – *en moravia dialekto.*) Pli poste la komercanto eksciis, ke tiu juna nigrulo havas eĉ ĉeĥan nomon: Josef Král. Li estis unu de orfoj, kiujn adoptigis membroj de Moravia Kunfrataro, kiuj elmigris en Usonon. Tiuj homoj ne estis riĉuloj, sed ili estis humanistoj. Kristana kredo ordonis al ili helpi al ĉiuj homoj. Ili havis proprajn infanojn, sed kapablis zorgi ankaŭ pri negraj orfoj, kiujn ili trovis. Tial Josef Král estis edukita laŭ kredo de la Moravia Kunfrataro kaj parolis ĉeĥe. Tio estas ekzemplo de vera humanismo de membroj de la Moravia Kunfrataro.

Kio estas la Moravia Kunfrataro?

Religian sekton nomatan Unuiĝo de Fratoj fondis frato Gregoro (ĉeĥe Řehoř, †1474) en bohemia vilaĝo Kunvald en la jaro 1457. Kunfrataranoj volis esti pli piaj ol iliaj antaŭuloj. Homoj, laŭ ili, devis esti egalaj. Tiuj idealoj ne estis novaj, ĉar husanoj en la 15-a jarcento havis la samajn opiniojn. Sed la kunfrataranoj sciis historion de husanaj militoj, kiuj daŭris 14 jarojn (1420 – 1434), havis multe da viktimoj kaj detruis landon. Tiam la kunfrataranoj rifuzis perforton.

La Kunfrataro emfazis kredon kaj malestimis klercon en la 15-a jarcento. Kunfrataranoj estis izolitaj de societo. Tio ŝanĝiĝis en fino de la 15-a jarcento (sinodo en Brandýs super Orlice, 1490) kaj en la 16-a jarcento. Luko el Prago (1460? – 1528), kiu estis bohemia teologo kaj episkopo de la Kunfrataro ekde la jaro 1500, ekkomprenis, ke la kunfrataranoj devas esti edukitaj.

Politika situacio en la 16-a jarcento

Jan Blahoslav naskiĝis dum regado de Ludoviko Jagelo (1506 – 1526). Tiu juna, 20-jara, reĝo delis batali kontraŭ turkoj. Liaj aliancanoj perfidis lin kaj li havis nur 25 mil soldatojn antaŭ batalo apud Mohács (suda Hungario) en la jaro 1526. Granda armeo (55 mil soldatoj) de turka sultano Sulejman II venkis armeon de sensperta reĝo, kiu post la batalo dronis en marĉoj. Ludoviko estis lasta reganto de dinastio Jagelo. Tial post lia morto ĉeĥan tronon gajnis Habsburgoj, dinastio, kiu regis ĝis la jaro 1918. (Lasta bohemia reĝo estis Karolo I, kiu mortis en Madeira en la jaro 1922.)

La unua habsburga reganto estis Ferdinando I Habsburga (1503 – 1564). La 16-a jarcento estis pli trankvila ol antaŭa 15-a kaj venonta 17-a jarcento, ĉar teritorioj de Bohemio

kaj Moravio ne suferis de militoj. Sed nobelaro de Bohemio ne akceptis Ferdinandon bone kaj ekribelis kontraŭ li en la jaro 1547. Pli aĝa frato de Ferdinando, Karolo V (1500 – 1558) volis batali kontraŭ germanaj nekatolikoj. Ferdinando volis helpi al sia frato uzonte bohemiajn soldatojn. Sed bohemia nobelaro ekribelis kaj ne helpis. Post batalo apud Mühlberg (1547), en kiu Habsburgoj venkis nekatolikojn, Ferdinando I revenis en Bohemion, por ke punigu la nobelaron. Li dividis siajn malamikojn, nobelaron kaj urbanojn, kaj precipe malfortigis urbanojn. Krom tio en nia lando regis guberniestro Ferdinando II Tirola (1529 – 1595) en la jaroj 1548 – 1567 kaj pli poste Maksimiliano II Habsburga (1527 – 1576).

Kompare kun aliaj eŭropaj landoj en Bohemio kaj Moravio estis granda religia toleremo.

Vivo de Jan Blahoslav

Jan Blahoslav naskiĝis en Přerov la 20-an de februaro 1523 (**Bildoj 1, 2 kaj 3**). Familia nomo de lia patro, riĉa urbano, kiu loĝis en Supra Placo (ĉeĥe Horní náměstí) estis Blažek. Lia patrino Katarina (ĉeĥe Kateřina) apartenis al fervora membrino de Moravia Kunfrataro. La urbo Přerov estis signifa centro de la Kunfrataro en komenco de la 16-a jarcento.

Jan Blahoslav studadis en lernejoj de la Kunfrataro en Přerov kaj Prostějov, kie li bone proprigis al si latinan lingvon.

La Kunfrataro havis aŭsterajn kondutmanierojn. La gefratoj estis tre piaj, sed ilia morala kodekso estis ofte misformita. La piuloj samtempe estis kontrolistoj de aliaj, fieruloj, homoj, kiuj kapablis fervore defendi la Kunfrataron, sed ankaŭ malami aliajn homojn.

En la Kunfrataro regis opinio, ke ili ne bezonas klercon. Kiam Jan Blahoslav naskiĝis (1523), Martin Luther (1483 – 1546) riproĉis al la kunfrataranoj malbonan sciaĵon de klasikaj lingvoj. Luko de Prago, bakalaŭro de la praga Universitato, malkonsentis, sed pli poste li subtenis studadon de Blahoslav eĉ eksterlande.

En la jaro 1540 oni decidis, ke Jan Blahoslav prepariĝos por pastra profesio. Tial Jan Blahoslav estis sendita en gimnazon en silezian urbeton Złota Góra (Ora Monto, germane Goldberg). Estro de la gimnazio, Valentin Troitzendorf, estis tre rigora kaj liaj lernantoj studadis sukcese. Ĉeĥaj elmigrintoj trovis rifuĝejon en pola urbeto Śamotuli (pole Szamotuly), kie protektigis ilin grafo Andrzej Górka, jam en la jaro 1548. En la jaro 1544 Jan Blahoslav ekstudis en Wittenberg, kie li eksciis humanismon. Tie li renkontiĝis kun Martin Luther (1483 – 1546) kaj Philipp Melanchton (1497 – 1560). Kiam en Germanio komencis ŝmalkada milito (1546 – 1547), Blahoslav revenis en Moravion. Li fariĝis helpanto de Martin Michalec kaj pli poste Matouš Strejc en Prostějov. Post reveno li eldonis sian unuan skribaĵon „Pri origino de la Kunfrataro“ („O původu Jednoty bratrské“, 1547).

En la jaro 1549 estis Jan Blahoslav sendita en la urbon Kaliningrado (Prusio), sed li devis baldaŭ reveni, ĉar en la urbo aperis pesta epidemio. En la sama jaro li ekstudis en Bazelo, sed tie li tre malsaniĝis. Pro tio li devis reveni hejmen en la jaro 1550.

Resaniĝinte en Přerov li verkis skribaĵon „Pri vidsento“ („O zraku“, 1550). Laŭ tiu skribaĵo vidkapablo kondukas homon en tenton helpante peki. Tio ne signifas, ke blinduloj ne pekas. En batalo kontraŭ la tento ne helpas blindecon, sed persona disciplino. Ni povas vidi, sed ni devas ĉiam korektigi nian konduton laŭ moralaj principoj.

En la jaro 1551 Jan Blahoslav instruis en kunfrataro lernejo en la urbo Prostějov. Ekde la jaro 1552 li loĝis en Mladá Boleslav kiel helpanto de Jan Černý. En la jaro 1553 li fariĝis pastro. Li kontinuigis en laboro de la pastro Jan Černý, kiu dokumentis historion de la Kunfrataro. Blahoslav nomigis tiun dokumenton „Aktoj de Unuiĝo de Fratoj, tio estas kolektaĵo de tiuj agoj, kiuj en la Unuiĝo de Fratoj kaj precipe en bohemia regno estis faritaj ekde la jaro 1547 ĝis la jaro 1549“ (latine kaj ĉeĥe „Acta unitatis fratrorum, to jest

shromáždění pospolné těch věcí, kteréž v Jednotě bratrské a nejmíc v království českém puosobeny sou od léta 1547 až do 1549“). Li aranĝis ok volumojn de la Aktoj (volumojn II – IX). Ekde la jaro 1552 li jam skribis mem tiun dokumenton ĝis la jaro 1568. Post morto de Blahoslav (†1571) kontinuus tiun laboron Ondřej Štefan. Krom la Aktoj Jan Blahoslav kompilis „Nekrologion“ – la unuaj notoj temas pri fondado de la Kunfrataro kaj morto de lia fondinto, frato Gregoro (†1474).

En la jaro 1557 Jan Blahoslav fariĝis episkopo de la Kunfrataro. En la jaro 1558 Jan Blahoslav translokiĝis en la urbon Ivančice. Li fariĝis oficiala historiisto de Kunfrataro.

Bertold el Lipé estis moravia landa hetmano en la jaroj 1566 – 1575 (**Bildo 4**). Li toleris Kunfrataron. Lia edzino Zuzana Černohorská el Boskovice (†1572) subtenis Kunfrataron finance.

Kaŝa presejo de la Kunfrataro ekfunkciis sub kaŝnomo En Ĝardena Insulo (latine In insula hortensis) en Ivančice en la jaro 1562.

Nuntempe oni povas trovi en Ivančice ruinon de kunfratara preĝejo (**Bildo 5**), monumenton de Jan Blahoslav (**Bildo 6**) kaj domon, kiu apartenis al kunfratara altlernejo (**Bildo 7**). Super pordo de la altlernejo oni povas legi latinan surskribon: *Exilium tellus, mors janua, patria Coelum. Omnia praetereunt praeter amare Deum. Anno Domini MDCXV* (La mondo estas ekzilejo, la morto estas pordego, la Ĉielo estas patrujo. Ĉio finiĝos krome amado de la Dio. En la jaro de la Sinjoro 1615).

Blahoslav korektigis Kantikaron de Ŝamotuli el la jaro 1541. Li volis eviti penetron de malbonaj ideoj el diversaj nekunfrataraj fontoj kaj malaltkvalitan komponadon de kunfrataraj amatoroj. Spertojn de tiun laboro Blahoslav utiligis skribante sian verkaĵon Muziko (Musica, 1558). Tio estis la unua ĉeĥlingva verkaĵo pri muzikaj teorio kaj praktiko. Ŝamotula Kantikaro estis eldonita la 7-an de junio 1561; ĝi enhavis 754 kantojn.

Kantikaro de Ivančice estis eldonita en la jaro 1564.

Jan Blahoslav eldonis verkaĵon „Filipiko kontraŭ malamikoj de muzoj“ („Filipika proti misomusům“) en la jaro 1567. Li defendis edukadon kontraŭ kunfrataranoj, kiuj rifuzis edukadon. Unu de grandaj malamikoj de edukado en la Kunfrataro estis Jan Augusta (1500 – 1572). Li estis origine ĉapelisto, sed fariĝis predikanto kaj episkopo de la Kunfrataro. En la jaro 1548 li estis malliberigita kaj 16 jarojn travivis en malliberejo de la burgo Křivoklát. Jan Augusta estis brava viro, tre laborema, sed ne tre talenta. Li komponis multe da religiaj kantoj, sed tiuj kantoj ne estis valoraj. Pli utila estis lia klopodo unuigi diversajn reformaciajn fluojn. Post lia morto tiuj fluoj estis unuigitaj en Bohemia Konfeso (Česká konfese, 1575).

En sia „Filipiko“ Blahoslav akcentis ideon, ke se la Kunfrataro volas sukcesi, ĝi bezonas edukitajn anojn.

Libron „Ĉeĥa Gramatiko“ („Gramatika česká“, 1571) li verkis 20 jarojn, ĝis sia morto.

Blahoslav en Gramatiko konsideris slovakon lingvon sudslava lingvo. Li neniam menciis praslavan lingvon. Moraviajn dialektojn li tre malestimis. Laŭ Blahoslav la plej bela ĉeĥa lingvo estas en Prago, proksime Nimburko, en mladá Boleslav, Hradec Králové kaj Litomyšl.

Blahoslav entreprenis kvar diplomatajn vojaĝojn en Vienon dum la jaroj 1555-1557 kaj unu vojaĝon en Germanio (1556). Li volis scii novajn informoj kaj plibonigi situacion de la Kunfrataro en Bohemio. (pli bona situacio ol en Bohemio estis en Moravio, ĉar moravianoj ne ribelis kontraŭ Ferdinando I.

Jan Blahoslav ĉeĥigis Novan Testamenton. La traduko estis presita en kaŝa presejo de Moravia Kunfrataro en Ivančice en la jaro 1564. La dua eldono de la traduko de Nova Testamento estis eldonita en la jaro 1568. Post lia morto liaj kunlaborantoj tradukis Malnovan Testamenton (1577).

La Biblio de Kralice estis presita en presejo de Moravia Kunfrataro en Kralice super Oslava en la jaroj 1579 – 1593. La sesa volumo de tiu sesvoluma Biblio estis traduko de la nova Testamento de Jan Blahoslav. Ĝi estis preta jam en la jaro 1593, sed eldonita nur en la jaro 1594.

Lernolibro „Instruo por junuloj“ (ĉeĥe „Naučení mládencům“) estis dufoje eldonita post morto de Blahoslav en la jaroj 1585 kaj 1609.

Verkaĵo „Eraroj de predikantoj“ (ĉeĥe „Vady kazatelů“, 1570) neniam estis eldonita, sed cirkuliĝis en transskribaĵoj.

Malsanoj kaj fino de vivo

Historiistino Vlasta Fialová (1896-1971) rimarkis, ke unu de viroj, kiuj estas pentritaj sur titolaj paĝoj de Ŝamotula Kantikaro kaj Kantikaro de Ivančice, portas okulvitrojn. Tiu viro estis Jan Blahoslav. La okulvitroj estis multekostaj kaj malbone haveblaj en la 16-a jarcento. Dank´ al Vlasta Fialová ni nuntempe scias aspekton de Jan Blahoslav.

Episkopo Jan Blahoslav estis tre malsana jam dum sia juneco. Li suferis de misdigestoj, havis kalkulusojn, kaj en lastaj jaroj de sia vivo ankaŭ brustan anginon. Kuloj infektigis lin per malario verŝajne en Valtice, en suda Moravio. Li malsaniĝis la 5-an de septembro 1571, travivis 25 malariajn atakojn kaj mortis en Moravský Krumlov la 24-an de novembro 1571. Li estas enkriptigita verŝajne en preĝejo de la Plej Sankta Triopo en Ivančice (**Bildo 8**).

Epilogo

Post 21 jaroj naskiĝis en suda Moravio Jan Ámos Komenský (1592 – 1670), nova elstarulo kaj episkopo de la Kunfrataro. Li devis elmigri en la jaro 1628 kiel multe da aliaj kunfrataranoj. Sed membroj de la Kunfrataro estis agemaj ankaŭ eksterlande. En la 18-a jarcento misiistoj de la Kunfrataro laboris en multe da landoj de la mondo. Ekzemple Matouš Stach el Mankovice, kiu loĝis en urbo Herrnhut (Germanio), kaj du kunlaborantoj iris en Groenlando en januaro 1733. Krome malsanoj (variolo, skorbuto) atendis ilin malsato. Du jaroj ili manĝis nur konkojn kaj algojn. Poste ili ricevis nutraĵon el danaj ŝipoj. Kompare de indiĝenoj, eskimoj, ili estis malriĉuloj. Vane ili eksplikis al eskimoj, ke ili volas instrui ilin pri kredo je la Dio. Eskimoj mokis ilin: „Ĉu vi volas instrui nin? Ni bone scias, ke vi estas needukitaj kaj devas lerni ĉe ni!“ Sed post sep jaroj la unua eskimo volis esti baptigita. Novaj misiistoj alvenis. Misia centro estis pligrandigita. Kaj misiistoj eklaboris en Kanado kaj Usono. La kunfrataranoj estis popularaj inter indianoj, ĉar ili helpis al ili kiel humanistoj. Kristanigitaj indianoj, kiuj lernis kampkulturadon ĉe la kunfrataranoj, estis tiel dankemaj al ili, ke ili eĉ volonte eknomiĝis Moraviaj indianoj (angle the Moravian Indians).

Tial laboro de Jan Blahoslav kontinuus kaj kontinuas ankaŭ nuntempe, en la 21-a jarcento.

Domo de Blahoslav en Brno

Domo de Blahoslav (ĉeĥe Blahoslavův dům) en Brno (Strato Lidická 79/719) estis fondita en la jaro 1924 (**Bildo 9**). En la domo nuntempe rezidas Ĉeĥfrata eklezio evangelika.

Rekomendita literaturo


BOHATCOVÁ, M. (1971): K dochování Blahoslavových spisů. Z Kralické tvrže, 5: 2-3.

- BRAMBORA, J. (1971): Balbín a Blahoslav. Paňoj 91-93. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paňoj.
- CHALOUPKA, J. (1971): Diplomatické cestry Jana Blahoslava. Z Kralické tvrze, 5: 36-38.
- ČAPEK, V. (1990): Historie bible. 3-a eld., Prago, Advent, 126 paňoj.
- ČEJKA, M., ŠLOSAR, D. & NECHUTOVÁ, J. (1991): Gramatika česká Jana Blahoslava. 1-a eld., Brno, Masarykova univerzita v Brně, 429 paňoj.
- ČERVENKA, J. (1971): Basilejský humanismus a Jan Blahoslav. Paňoj 50-63. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paňoj.
- FIALOVÁ, V. (1971): Jan Blahoslav – zakladatel nejslavnější tiskárny Českých bratří. Z Kralické tvrze, 5: 29-35.
- FISCHER, O.A. (2012): Karolo la Pli Aĝa el Žerotín, <http://www.literatura.bucek.name/fischer/zerotin.html>
- FISCHER, O.A. (2012): Kuloj – flugantaj turmentuloj, <http://www.medy.cz/brno-esperanto/fischer-kuloj.pdf>
- FISCHER, O.A. (2013): Libro de libroj, <http://www.medy.cz/brno-esperanto/fischer-libro-de-libroj.pdf>
- GREGOR, A. (1971): O Blahoslavově mluvnicí. Z Kralické tvrze, 5: 4-9.
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1995): Toulky českou minulostí, vol. 2, 1-a eld., Prago, Baronet, 454 paňoj.
- HRUBEŠ, J. (1971): Několik poznámek na téma Blahoslav jako předchůdce Komenského. Paňoj 32-35. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paňoj.
- HÝBL, F. (1974): Jan Blahoslav. 1-a eld., Přerov, Vlastivědný ústav, 7 paňoj.
- JANÁČEK, J. (1966): Jan Blahoslav. 1-a eld., Prago, Svobodné slovo, 189 paňoj.
- MALOVEC, M. (2011): Filipina Welser kaj Ferdinando de Tirolo. <http://www.medy.cz/brno-esperanto/welser.pdf>
- MOLNÁR, A. (1971): Motivy Blahoslavova pohledu na dějiny. Paňoj 15-23. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paňoj.
- NĚMEC, F. (1971): Příčiny předčasné smrti Jana Blahoslava. Z Kralické tvrze, 5: 39-40.
- POLIŠENSKÝ, J. (1971): Jan Blahoslav – předchůdce Komenského. Paňo 7. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paňoj.
- RŮŽIČKA, J. (2002): První Moravané v zemích psích spřežení. Pes - přítel člověka, 2: 86.
- SETTARI, O. (1971): Jan Blahoslav jako hudební teoretik a hymnograf. Z Kralické tvrze, 5: 18-28.
- SKUTIL, J. (1971): Slovanské jazyky a nářečí v Blahoslavově Gramatice. Paňoj 154-157. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paňoj.
- ŚLIZIŃSKI, J. (1971): Jan Blahoslav a Polsko. Paňoj 88-90. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paňoj.
- TICHÁ, Z. (1984): Cesta starší české literatury, 1-a eld., Prago, Panorama, 304 paňoj.
- UHROVÁ, O. (1971): Kde byl pohřben Jan Blahoslav. Z Kralické tvrze, 5: 41-44.


PŘEROV




**MONUMENTO DE JAN BLAHOŠLAV EN PŘEROV
(AŬTORO: FRANTIŠEK BÍLEK, 1923)**



MONUMENTO DE JAN BLAHOŠLAV (DETALO)



BLAZONO DE NOBELOJ EL LIPÉ EN IVANČICE



RUINO DE KUNFRATARA PREĜEJO EN IVANČICE



IVANČICE, MONUMENTO DE JAN BLAHOŠLAV



KUNFRATARA ALTLERNEJO EN IVANČICE



PREĜEJO DE LA PLEJ SANKTA TRIPO



DOMO DE BLAHOŠLAV EN BRNO

